

la verda stelo



ESPERANTO
NEDERLAND

SEKCIO GRONINGEN-DRENTE
&
FRISA ESPERANTISTA RONDO

majo 2007



LA VERDA STELO

eldono de

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND

ESPERANTO-KLUBO GRONINGEN-DRENTÉ

prezidanto

s-ro J.B. Swenker
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
tel. +3150 527 45 72

retadreso:

prezidanto.groningen@esperanto.hobby.nl

sekretario

s-ino W. van Ganswijk-Vlasblom
Huygensstraat 27
9727 JA Groningen
tel. +3150 525 00 86
retadreso: wvganswk@xs4all.nl

kasisto

s-ro L. Staghouwer
Julianalaan 25
9781 ED Bedum
tel. +3150 301 40 15
retadreso: luitstaghouwer@home.nl

FRISA ESPERANTISTA RONDO

s-ro W. Akkerman
Westerein 14 a
8571 GB Harich (Frl)
tel. +3151 460 22 72
retadreso: wiebrenakkerman@hetnet.nl

ttt-ejo

<http://pingveno.nl/klubo>

kunvenejo

Dreesflat, W. Dreesstraat 1
ĉiun alternan ĵaŭdon ni kunvenas
de la 19h45 ĝis la 21h45

Esperanto-centro

T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
J.B. Swenker, tel. +3150 527 45 72

redakcio

Koos Scharroo
Wil van Ganswijk-Vlasblom
retpoŝto: laverdastelo@pingveno.nl



Enhavo

- 3 ... Invito al nia jubileo
- 5 ... Klubkunvenoj, naskiĝtagoj
- 6 ... Sciigo de la kasisto
- 7 ... Kio pri la nordo?
- 12 ... Lanĉita la lingvolanĉilo

Contributie Esperanto Noord-Nederland 2007

Afdelingslid (incl. abonnement LA VERDA STELO)	€ 12,50
Gezinslid	€ 6,25
Donateur (minimaal)	€ 7,00
Abonnement LA VERDA STELO	€ 7,00

Over te maken op Postbanknr. **3822472** t.n.v.

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND te Bedum

Leden van Esperanto Noord-Nederland worden geacht lid te zijn van
ESPERANTO NEDERLAND

Vandaar dat wij hier ook het gironummer ervan vermelden:

Postbanknr. **375522** t.n.v. **ESPERANTO NEDERLAND** te Heerhugowaard

Lidmaatschap (incl. abonnement FEN-X)	€ 27,50
Gezinslid	€ 8,00



Esperanto Noord-Nederland

Esperanto Nederland *sekcio Groningen-Drente*
 en rilatoj kun *Frisa Esperantista Rondo*

Ni kore invitas la 16-an de junio 2007

Ĉiujn esperantistojn en kaj ekster Nederlando al la provinco *Fryslân (Friesland)* por festi kun ni la unujaran jubileon de *Esperanto Noord-Nederland* kaj rememori la fondon, respektive en 1926 kaj 1925, de *Frisa Esperantista Rondo* kaj *Esperanto-klubo Groningen-Drente*. Fryslân indas vian viziton krome pro la bela naturo kaj pitoreskaj urboj.



LA PROGRAMO


- ☒ Akcepto de 10h00 kun kafo kaj frisa kuko sur la boato *Redbad* en la vilaĝo *Terherne (Terhorne)*.
- ☒ Rondveturo per boato de 10h30 sur lagoj kaj kanaloj. Paŭzo en la fama akvourbo *Snits (Sneek)*
- ☒ Lunĉo prezentata surŝipe
- ☒ Adiaŭa festmanĝo en kafejo-restoracio en Terherne
- ☒ Fino de la programo je 19h00

Tiu ĉi bela aranĝo kostas po nur € 25,--

Bonvolu anonci vian partoprenon *ne pli malfrue ol la 1-an de junio* per transkontigo de la ŝuldita sumo en ĝirkonton **38 22 472** ĉe *Postbank* je la nomo de *Esperanto Noord-Nederland* en *Bedum*.

Vi tre helpas nin en la organizado de la aranĝo, se vi anoncos vian partoprenon **ANKAŬ** retpoŝte: jubileo@pingveno.nl (aŭ telefone: +316 22 41 32 67 - K. Scharroo)

Kiel trovi la boaton? Bonvolu turni.



Terherne estas plej facile atingebla per aŭto:

- Venante de *Groningen*, vi sekvu la ŝoseon A7 ĝis *Joure-West*. En Joure vi sekvu la indikilon al *Terherne*, 11 km.
- Venante de la direkto de *Sneek* laŭ la A7, vi sekvu la elirejon *Joure-West*. Poste vi sekvu la indikilon *Terherne*.
- En *Terherne* vi veturu ĝis la memserva vendejo *Feyen* kaj eniru la kontraŭan vojon (*Syl*). Post ĉ. 600 m vi trovos la kajon de la boato *Redbad* (ĉ. 50 m preter kafejo *Portunus*). Parkadejo haveblas.
- Por vojaĝi per publikaj transportiloj, konsultu eventuale Interreton: www.9292ov.nl
- Tranoktebloj kontraŭ moderaj prezoj, se vi deziras, estas en *Sneek*, *Joure*, *Akkrum* kaj *Heerenveen*. Tion prizorgu vi mem.



Klubkunvenoj

majo

- 3 kvizo pri lingvoj – Bert Begeman
- 31 kune manĝi

junio

- 28 10:00h somera renkontiĝo en *Scandinavisch Dorp*

aŭgusto

- 2 10:00h somera renkontiĝo en *Schimmelpenninckhuis*

septembro

- 6 ferioj
- 20 gastpreleganto

oktobro

- 4 malferma vespero
- 18 instrumaterialoj (CD, DVD, video)

novembro

- 1 judoj en Nederlando
- 15 Tajvano – *Anneke Schouten* (gastpreleganto)
- 29 falsaj amikoj

decembro

- 13 festvespero

- ŝanĝoj rezervitaj -

la plej freŝajn novaĵojn kaj ŝanĝojn vi trovos en nia retejo sub la rubriko **Aktuale**.

<http://pingveno.nl/klubo>

Naskiĝtagoj

majo

- 7 G.C. Boer
- 11 J. Hennekam-Tijs
- 23 Frans Schild

julio

- 9 D. Langers
- 20 H. Smith

junio

- 1 A.M. Oosterwijk-Dominicus
- 8 H. van Dalen
- 24 W. Rijnders kaj
J. Snoek

aŭgusto

- 14 J. Reddingius
- 16 H.P.P. Stigter kaj
Koos Scharroo
- 17 E. Huisman
- 30 J.B. Swenker

Gratulon!

Sciigo de la kasisto

Sunleviĝo estas senkosta, sed esti membro de la klubo aŭ aboni nian informilon tamen ne. Pro tio mi volonte memorigas al vi, ke estas bona kutimo de membroj kaj abonantoj pagi kotizon.

Mi esperas, ke tiu rimarko instigas vin tion fari por la jaro 2007, se vi ne havis tempon plenumi tiun taskon ĝis nun.

Bonvolu ne forgesi: *pago prokrastita ofte iĝas pago nefarita.*

Anticipe dankas vin

Luit Staghouver

Er zit muziek in.

Money, money, money. Een aantal jaren geleden was dit een wereldhit van de groep *Abba*. Inderdaad, in onze wereld draait niet alles, maar toch wel veel om geld.

Zonder geld geen brood op de plank. Ook een vereniging heeft met dit simpele feit te maken. Die kan niet bestaan als de leden en/of abonnees hun contributie niet betalen.

Als dit inderdaad nog niet is gebeurd, denk dan maar: *beter laat dan nooit.* Op bladzijde 2 staat alle informatie die je nodig hebt om een betaalopdracht in te vullen.

Alvast bedankt.

Luit Staghouver



Jam en multaj jaroj nia klubo donacas al io rilate Esperanton. Iam ni helpis pagi instrumaterialon por Murmansk, alifoje ni helpis subvencii instrulokon al la amsterdama universitato.

Ĉi-jare ni decidis doni iom da mono al ***Een school in Togo.***

Dankletero de Hans Bakker estis la tuja rezulto.

La vera rezulto estas, kompreneble, ke infano povos lerni.

Kio pri la nordo?

11 januaro 2007

Kelkajn envenintaĵojn kunportis Koos Scharroo de Wil, kiu ne ĉeestis:

- karto de Rob Moerbeek, per kiu li dankas pro la senditaj ok novstilaj *La Verdaj Steloj*. Ankaŭ niaj venontaj informiloj trovos lokon en la biblioteko de UEA.
- invito por la klubo al Kulturtago en Oldenburgo, kiu okazos la 13-an de oktobro ĉi-jare kaj kies temo estos *Najbaroj*.
- informo pri la 33-a Internacia Semajno de Esperanto en Sète (Francio) okazonta de la 18-a ĝis la 25-a de aŭgusto. Interesiĝantoj petu informojn de jf.passarella@free.fr.
- novjarsaluto de s-ro *Balaž* de Eŭropa Esperanto-Unio kun informo pri novjara numero de *Eŭropa Bulteno*.

Ineke ricevis inviton aliĝi kiel sekretario al la LKK de la 2008-a Universala Kongreso, kiu okazos en Roterdamo.

Kun kelkaj kolegoj Koos faris mallongan ekskurson al Svedio. Pro sia laboro ili flugis al *Malmö* malfrue vespere, kaj la sekvan tagon antaŭ ol heliĝis, ili surteriĝis denove sur la groningeran flughavenon. El la universitata malsanulejo de la urbo *Lund* ili kunportis paron da pulmoj por transplantado.

Johan faris liston de Esperanto-libroj, kiujn li ricevis antaŭ nelonge. Temas entute pri 411 libroj, libretoj kaj broŝuroj. Li informpetos ĉu estas titoloj inter ili, kiuj ankoraŭ mankas al la biblioteko en Amsterdamo. Aliaj libroj iros eble al Afriko aŭ Rumanio.

Laŭ la klubo programo montros Ineke la 22-an de februaro filmon pri la lernejo en Togo. Montriĝis, ke vizitis tiun lernejon Joeri Smolders el Wormerveer, kaj Ineke proponis inviti lin por prelego.

Ĉar la temo estas *vivanta gazeto*, Luit kunportis plurajn gazeteltondaĵojn:

- Kupro estas ŝatata materialo de ŝtelistoj nuntempe. Oni forprenas la kuprajn kablojn ne nur de la fervoja kompanio kaj de la preĝejaj fulmoprotektiloj, sed ankaŭ tiujn de la luminstalaĵo de futbalklubo.
- De kelkaj monatoj validas novaj reguloj por pasportaj fotoj. Kelkfoje kaŭzas tiuj reguloj problemon. Pro la malfermita buŝo oni ripetfoje rifuzis la fotojn de preskaŭ duonjara knabeto.
- Centoj da birdoŝatantoj veturis al la dunoj apud Zandvoort. Ili iris tien observi la malgrandan bluvostulon. Tiu birdo vere estas raraĵo en nia lando. En tiu periodo la bluvostuloj troviĝas en Hindio kaj Pakistano.



bluvostulo

Ineke kunportis mapon kaj broŝurojn de *Gran Canaria*. Kun kelkaj geamikoj ŝi tie feris dum unu semajno. Kun plezuro ŝi konstatis, ke matene, kiam endome estas malvarme ankoraŭ, ekstere

jam regas agrabla temperaturo. Ŝi volonte reiros al tiu insularo, sed preferene tiel frue en la jaro.

25 januaro 2007

Wiebren sendos leteron al la frisaj esperantistoj, por ke ni sciu, ĉu ili ja aŭ ne membriĝos al la klubo aŭ eble estos abonanto de nia informilo *La Verda Stelo*.

La dato de la ŝipekskurso en Frislando estas fiksita je la 16-a de junio. La ŝipo estas je nia dispono de 10.00h ĝis 17.00h kaj forveturos je la 10.30h el Terherne (proksime de Joure). La prezo de la ŝipekskurso inkluzivas kafon kun kuko, frisan lunĉon kaj komunan tagmanĝon en restoracio en Terherne. La ŝipo haltos en Sneek por unuhora paŭzo. La partoprenantoj povos fari promenon tra Sneek aŭ eventuale viziti la *Frisan Navigadomuzeon* aŭ la *Nacian Miniaturfervojan Muzeon*.

Per anonco en *Fen-X* kaj *La Verda Stelo* ni invitos nederlandajn esperantistojn partopreni ĉi tiun ekskurson. Ni sendos invitilon al niaj germanaj Esperanto-amikoj. Surŝipe estos loko por proksimume 60 partoprenantoj. La nederlandaj esperantistoj anoncu sin per antaŭpago en la konton de *Esperanto Noord-Nederland*.

En la kluba retejo troveblas la retadreso de *Pola Radio*. La elsendoj estas aŭskulteblaj nur rete (tagnokte). Ne nur la 'hodiaŭa' elsendo aŭskulteblas, sed ankaŭ tiu de la antaŭaj naŭ tagoj. Luit kunportis kelkajn bildenigmojn, kiujn li trovis en la distra revuo *Enigmo*. Nesolvebla enigmo kelkfoje montriĝas tre simpla, se oni havas nur la 'ĝustan ŝlosilon'.

Pri detalo de foto prave opiniis Bert, ke la haroj sur la foto iomete similas okulharojn. La prezentita foto montras detalon de la *ordinara okulhara fungo*.

Ĉi tiu fungo kreskas sur malsekaj faligitaj arbotrunkoj kaj -branĉoj. Kvankam ĝi estas ordinara fungo, nur malmultaj homoj konas ĝin, sed tio ne mirindas, ĉar la fungo estas malgranda kaj la okulharoj preskaŭ ne videblas nudokule.

Luit prezentis ankaŭ kelkajn bildojn tridimensiajn. Por kelkaj el ni restis kaŝita tiu tria dimensio.



ordinara okulhara fungo

8 februaro 2007

La jarkunveno ne okazis pro tro malbona vetero.

22 februaro 2007

Okazis nia jarkunveno. Kiel ĉiam ĝi estis ankaŭ normala klubkunveno, kio signifas, ke ni multe babilis. Ni longe diskutis ekzemple pri la gramatik(l)aĵo: ĉu raporto estis *aprobata* aŭ *aprobata*?

Dum la paŭzo ni diskutis pri supersignitaj literoj. Precipe pri interretaj kursanoj, kiuj persistas en la uzado de tiaj specialaj literoj. Ili skribas, ke la supersignoj bele kaj ĝuste aperas sur ilia ekrano, sed ili ĉiam forgesas, ke pli gravas la rezulto ĉe la ricevanto.

Sufiĉe grave por anonci estas, ke:

- post jaroj, dum kiuj la kotizo estis po

25 guldenoj, ni pasintjare decidis plialtigi la kotizon por la jaro 2007 kaj ankaŭ 2008 ĝis po12,50 eŭroj.

- la kaskontrolkomisionon konsistigas Ineke Emmelkamp kaj Frans Schild. Kaj anstataŭanto kaj ŝoforo estas Koos Scharroo.

- la estraro denove ne ŝanĝiĝis.

La ceteron vi legos en la oficiala raporto pri la jarkunveno.

8 marto 2007

Pli kaj pli da reagoj envenis pro la invito al la jubileo en Terhorne.

Johan menciis partoprenon per Esperanto-budo en la KEI-semajno de 2007 (por unuajaraj studentoj).

Venis invito el *Unterweser* partopreni en konkurso pri ĵetado de balailoj, kiu estas tiea popolfesto kaj okazos meze de marto.

Post kafotrinkado estas la parolvico al nia nova membro *Jesse van Oort*, kiu lernis Esperanton inter la 16-a de januaro kaj la 19-a de marto 2006 per la interreta kurso.




Jesse van Oort

La temo, pri kiu li rakontis, estis *mueliloj*. Li akiris antaŭ nelonge post 3-jara studo la diplomon pri libervola muelisto. Per bildoj sur la muro li klarigis al ni, kio okazas en diversspecaj muelejoj. Estas muelejoj, en kiuj oni segas arbojn, kaj estas aliaj, en kiuj oni

senŝeligas hordeon kaj muelas grenon por havi farunon. Cetere estas oleo kaj akvomuelejoj, sed Jesse parolis ne pri tiaj mueliloj.

En pratempoj oni muelis per ŝtonoj. La origino de mueliloj devenas de Irano.



muelejo 'de Otter' en 1911

Muelilo kapablas mueli 50-foje pli rapide ol homo. Estas muelejoj, kiuj mem turniĝas, de aliaj turniĝas nur la ĉapo. En Zaandam iam troviĝis dek mil segmueliloj, nuntempe estas en tuta Nederlando ne pli ol mil.



'de Otter' en 1999

La *Otter* en Amsterdamo estas verŝajne la plej aĝa muelejo. La arboj, el kiuj oni volas segi bretojn, devas esti kuŝintaj en akvo minimume kelkajn jarojn, por ke la sukoj eliru. Pri la funkciado de mueliloj oni povas legi en Esperanto en la libreto *Muelejoj*

en Nederlando, kiun Luit donacis al Jesse. Tiu ne sciis, ke ĝi ekzistas, kaj tre ĝojis pri tiu donaco. Jesse invitis nin viziti iufoje dum la venonta somero la muelejon en *Ten Boer*, kie li estas unu el la muelistoj.

22 marto 2007

Koos Scharroo kaj Frans Schild partoprenis en la pasinta studosemajnfino. Ankaŭ Wil ĉeestis, sed kiel instruistino. La aliaj instruistoj estis *Gerda Dercks*, *Rob Moerbeek* kaj *Bert de Wit*.



Guido Klijn, la plej juna partoprenanto

SinJORINO de iu reklamburoo en Den Helder telefonis al Wil kaj proponis, ke ni havu anoncon en la interreta gvidlibro de komunumo *Winsum*. Tia anonco kostas €55, =. Wil respondis nee al tiu propono.

En *Noord-Hollands Dagblad* estis publikigitaj pluraj reagoj al antaŭa, ŝajne ne vere favora, artikolo pri Esperanto. Kelkaj esperantistoj sendis reagon, kaj ili ĉiuj laŭdis Esperanton kaj rakontis pri siaj pozitivaj spertoj.

Wil volonte partoprenos la *Internacian Semajnfino* en Nordwalde (Germanio) de la 19-a ĝis la 21-a de oktobro. Ŝi scivolos, ĉu ankaŭ aliaj klubanoj havas tiun intencon.

Koos ricevis sep retmesaĝojn de interesiĝantoj pri la Esperanto-kurso. Montriĝis, ke temas pri mezlerneja instruisto kaj ses el liaj lernantoj.



Rob Moerbeek dum la studosemajnfino

Ni kune ludis unue la domenludon *Domiling-7*, kiu estas amuza kaj lerniga. Pro malĝusta interpreto de unu el la bildoj ni ne tuj sukcesis fermi la 'cirkolon'. Poste ni ludis domenludon, kiun Wil mem faris. Ankaŭ ĉi tiun fojon ni ludis entuziasme, kaj estas klare, ke tiu ekzemplo de kreiveco meritas imitadon.

Wil kunportis ankaŭ kovertojn, en kiuj estis la sama dudeko da vortoj. Alterne oni diru ion pri iu vorto (sen mencii la vorton), kaj la aliaj divenu pri kiu vorto temas. El la vortoj ĉiu poste faris dek vortoparojn. Montriĝis, ke kvankam ĉiu havas la samajn vortojn, farblas multe pli da vortoparoj ol nur dek. Per ĉi tiu amuza kaj plurfoje ridiga ludo finiĝis agrabla vespero.

5 aprilo 2007

Ni babilis iom pri Esperanto-okazintaĵoj dum la lastaj 2 semajnoj. La plej grava el tiuj estis la albumo kun eltondaĵoj pri la vojaĝoj, kiujn faris esperantisto *Adalberto Smit*, naskita en 1897.

Wil ricevis la albumon de sinjoro *Bolling* el la vilaĝo Leek. Estante neesperantisto, li ricevis ĝin de amiko, kiu

trovis ĝin en Amsterdamo en domo, kiun li devis renovigi. Kun multa intereso ni foliumis la albumon kun raportoj kaj tondaĵoj el la jaroj 1917 ĝis 1947, dum kiuj s-ro Smit unue prelegis en Nederlando por konatigi Esperanton. Ĉirkaŭ 1928 li vizitis pli ol cent urbojn en diversaj landoj, kie li rakontis en Esperanto pri Nederlando helpe de diapozitivaj.

Ni ege miris pri tio, ke ĝis nun ni neniam aŭdis ion pri sinjoro Smit. Post la kunveno Koos serĉis hejme la nomon de Adalberto Smit en Interreto kaj montriĝas, ke Ed Borsboom skribis pri li en la libro *La vivo de Andreo Cseh*. La kaŭzo de nia nescio verŝajne estas ke s-ro Smit fondis en la tridekaj jaroj hitlereman partion en Hago. Koos komentis, ke la plej okulfrapa parto de la vespero estis la donacita albumo, kiu poste montriĝis dubinda sed tamen interesa laŭ historia vidpunkto.



Adalberto Smit

La temo de la vespero estis *gramatiko*. Koos disdonis foliojn kun diversaj taskoj, kiujn ni plenumu, aŭdinte tekston el la libreto *Ĉu vi aŭdis, ke...* de *Katalin Kováts*. Temis pri artema elefanto en zooparko en Usono.

Montriĝis, ke ne estas facile memori tekston laŭvorte; pli facile estas re-memori laŭenhave.

☆☆☆



Kamsan, la kvarjara tajlanda elefantino pentras*

*fo(n)to: www.elephantart.com

Lanĉita la lingvolanĉilo

En kelkaj landoj de la mondo, la novaĵo, ke pli ol 100 infanoj lernas Esperanton, ne aparte okulfrapus. Tamen, kiam la koncerna lando estas Britio, hejmo de la internacie adoptita angla lingvo, kaj la infanoj lernas ne private sed en ŝtataj elementaj lernejoj (kie studas gejunuloj inter la aĝoj de 5 kaj 11 jaroj), la statistiko imponas. Des pli, ĉar lingvolernado ekis en la unua lernejo nur en septembro pasintjare, sed ĝi jam rikoltis pozitivajn kaj entuziasmajn reagojn kaj de instruistoj kaj, pli grave, de lernantoj.

Memevidente, la preparlaboroj estis farataj antaŭ septembre. Jam de du jaroj *Angela Tellier*, komisiito de Esperanto-Asocio de Britio (EAB) pri edukaj aferoj, prilaboras la projekton *Lingvolanĉilo* (angle: *Springboard to Languages*). Helpate de malgranda skipo de instruistoj, desegnistoj kaj aliaj konsilantoj, ŝi planis kaj verkis ne nur la kursmaterialojn sed ankaŭ la informkaj reklamilojn. Cetere ŝi interrilatis kun edukaj instancoj kaj kun la lernejoj mem. Ne forgesendas la rolo de EAB, kiu finance subtenas dum kvin jaroj la ambician kaj multekostan projekton.

Instigis kaj ebligis la iniciaton ŝanĝoj en la lingvo-politiko de la brita registaro (se, envere, eblas paroli pri lingvo-politiko en Britio). En la 1980-aj jaroj, pro enkonduko de t.n. nacia studprogramo, ne eblis oficiale instrui Esperanton en britaj lernejoj. Sankciitaj estis lingvoj de la Eŭropa Unio kaj tiuj de etnaj minoritatoj en Britio (ekzemple la kimra, la bengala, la guĝarata). Aliaj

lingvoj, inkluzive de Esperanto, estis permesataj, kondiĉe, ke unuavice estu studataj aprobitaj lingvoj de la nacia programo. Rezulte, Esperanto estingiĝis en britaj lernejoj krom kiel dumpaŭza aŭ hobia okupo (notinde en la nordangla urbo Skipton, kie *Malcolm Jones* inspiris siajn lernejanajn ĉeesti Universalan Kongreson; ankaŭ en sudokcidenta Anglio, en *Gloucester*, danke al *Elizabeth Stanley*).

Intertempe, parte pro granda elekto de lernejoj studfakoj konsiderataj pli facilaj ol lingvoj (ekzemple sociologio, psikologio, amaskomunikiloj), ŝrumpis intereso pri lingvolernado en duagrada lernejoj. Panikis la registaro, kiu ordonis, ke ekde la aĝo de 14 jaroj ne plu estu devige lerni fremdan lingvon (decido atakita de intelektuloj kaj eventuale, post registaro-ŝanĝo, renversota). Cetere, por stimuli lingvolernadon inter 11- ĝis 14-jaruloj, la registaro ĉi-februare anoncis, ke ĉe duagrada lernejoj la deviga instruado de almenaŭ unu EU-lingvo estos nuligita favore al 'ekonomie utilaj' lingvoj (ekzemple la ĉina aŭ la araba). Kompense, pro la ŝanĝoj ĉe duagrada nivelo, kaj por defendi sin kontraŭ kritikantoj, la registaro anoncis, ke ĝis la jaro 2010 ĉiu pli aĝa lernanto en elementa lernejo rajtos lerni fremdan lingvon.

Ĉi foje la registaro ne insistis pri aprobitaj lingvoj. Sciante, tamen ke en multaj elementaj lernejoj, sen sperto pri fremdlingva pedagogio, instruistoj frontas foje nerveze kaj senkonsile al sia nova defio, kaj rekonante la eblon

oficiale enkonduki la internacian lingvon en naciajn lernejojn, britaj esperantistoj ekagis. La rezulto estas Lingvolanĉilo, kiu celas ne nur instrui Esperanton sed ankaŭ - jen la hoko por lernejestroj - prezenti ĝin kiel lernfaciligan lingvon prepare al studado de aliaj lingvoj ĉe dua-grada lernejo. Substrekataj estas ankaŭ la tutmondaj kulturaj kontaktoj akireblaj pere de Esperanto.

Trovi lernejojn pretajn partopreni la pioniran fazon de la projekto ne facilis. En Britio la unua fremda lingvo, pro historiaj, ne plu pro ekonomiaj, kulturaj aŭ eĉ feriaj kialoj, estas la franca. Multaj britoj almenaŭ iomete lernis la francan, kaj do instruistoj en elementaj lernejoj sin preparas por instrui fremdan lingvon, provante freŝigi plejparte bazajn sciojn pri la franca. Konvinki ilin akiri kaj ekinstrui novan lingvon, aparte lingvon, kiu laŭ la brita subministro pri edukado, *Lordo Adonis*, en ĉi-jara letero al esperantisto “ne asociiĝas kun aparta kulturo”, foje senesperigis. Sed ĝis la komenco de la jaro anoncis sin du entreprenemaj elementaj lernejoj kun klarvidaj kaj, honeste, kuraĝaj lernejestroj, pretaj akcepti Lingvolanĉilon.

Apliki la konceptojn de Lingvolanĉilo teorie simplas. Vizitadas lernejon sperta esperantisto, kiu kunlaboras kaj kun instruistoj kaj kun infanoj. Do al la lernejo *Bar Hill*, en la orientangla universitata urbo *Kembriĝo* (kie okazis antaŭ 100 jaroj la tria Universala Kon-

greso de Esperanto), iras *Tim Morley*. Du fojojn semajne li instruas Esperanton dum 30 minutoj al po tri klasoj. Kunlernas dum almenaŭ unu el la du lecionoj ankaŭ instruistoj kaj helpinstruistoj, kiuj foje ricevas kromajn sesiojn. Trejnado de la instruistaro

aparte gravas: unu el la celoj de Lingvolanĉilo konsistas en tio, ke la Esperanta instruisto iom post iom retiriĝu, por ke la surlokaj instruistoj ekrespondecaj pri la Esperanto-lecionoj. Klare, ĉar unusola esperantisto ne povos daŭre instrui la lingvon al la 90 lernantoj, aĝantaj inter

sep kaj naŭ jaroj, ĉe lernejo *Bar Hill*. Krome, se progresos laŭplane Lingvolanĉilo, spertaj esperantistoj, kiaj *Tim*, estos bezonataj ĉe aliaj lernejoj por treni tieajn instruistojn.

Certe, la eventuala retiriĝo de ilia gvidanto iom timigas la instruistojn. Ekinstrui lingvon antaŭ kelkaj monatoj nekonatan, eĉ ĉe elementa nivelo, iom nervozigas. Laŭ unu el la instruistinoj ĉe *Bar Hill*, *Su Proctor*, lerni Esperanton ne facilas, ĉar mankas persona motivado. Cetere, ŝi aldonas, ŝi ne estas lingvistino. Alia instruistino, *Karen Hindmarsh*, tamen notas, ke ŝi relative rapide lernas. “Mi sufiĉe surpriziĝas, ke la lingvo enkapiĝas eĉ post nur duon-horo semajne. Aliflanke”, ŝi diras, “mi vere ne scias, ĉu en septembro mi kapablos ĝin instrui.”

Tamen, malgraŭ dubetoj pri siaj ontaj lingvo-kapabloj, ambaŭ instruistinoj



ekscitiĝas pri la pozitivaj efikoj de projekto, kiu komenciĝis en Bar Hill nur en septembro. Laŭ Su Proctor: “La infanoj ĝuas ĝin. Ĉiuj volas partopreni. Plaĉas la interagaj aspektoj, la rolulado kaj la Mazi-vidbendo. Memfidon ili akiras, ankaŭ la infanoj, kiuj ne aparte lertas en aliaj fakoj, kaj ĉi ĉio transiras al aliaj okupoj. Jen nova aliro al lingvolernado, kaj kiam ili eklernos la francan aŭ la germanan, ili pensos: ‘Pri tio mi jam sukcesis.’”

Samopinias *Karen Hindmarsh*: “Mi ne atendis, ke la infanoj tiom entuziasmiĝos. Kaj mi ne atendis, ke la pli mallertaj infanoj povos ĝin legi. Mi opiniis, ke tiuj frontas al sufiĉe da problemoj rilate legadon de la angla, sed fakte pli facilas legi Esperanton, kaj tio helpas ilin legi en la angla.”

Ankaŭ la lernejestrino ĉe Bar Hill, *Lin Whyte*, notas la kromefikojn de Esperanto, kiuj pozitive influas aliajn studfakojn kaj aparte helpas la malpli dotitajn infanojn. Ŝi diras: “Esperanto estas tre inkluziviga lingvo. Ĉiuj infanoj, senkonsidere pri kapableco, povas pro ĝia strukturo ĝin aliri. Ni intencas uzi ĝin por instrui aliajn fakojn, ekzemple legadon. Kaj ankaŭ numeradon.”

Kvankam bonvenaj estas la komentoj de la profesiuloj, ili restas subjektivaj kaj ankoraŭ sen scienca bazo. Sed, danke al financa helpo de *Esperantic Studies Foundation*, esploristoj de la pedagogia fakto de la prestiĝa nordangla Universitato de Manĉestro rigore kontrolas kaj priraportas la projekton dum kvinjara periodo (2007-2012). Espereble la rezultoj kontribuos al la trovitaĵoj de pli fruaj esploroj, ekzemple en Paderborn en la 1970-aj kaj 1980-aj ja-

roj, kaj en Monash, Aŭstralio, en 2000. Sed kion opinias pri Lingvolanĉilo la infanoj, kiuj pionire submetiĝas al argumentebla la plej ampleksa kaj eventuale la plej grava tia projekto iam entreprenita en Britio? La okjara *Ola*, kies gepatroj estas poldevenaj, kaj kiu parolas pole en la hejmo, notas, ke, se oni forigas la o-finaĵon de la vorto ‘domo’, restas ekvivalenta pola vorto. “Mi ŝatas lerni diversajn lingvojn: tio agrablas,” ŝi diras.

Plaĉas al okjara *Matt* kanti en Esperanto kaj fari la gestojn, kiuj akompanas la kanzonojn. “Esperanto estas interesa kaj mi lernas sufiĉe rapide,” li diras. Kaj jen *Matt* estas aparte frapita de la kontakto kun lernejo en Benino starigita kadre de Lingvolanĉilo. Li komentas: “Estas ŝoke vidi, ke en Afriko kelkaj neniam vidis aŭ tuŝis komputilon. Mi kredas, ke, se ili venus al Britio, ankaŭ ili mirus pro la elektro, kiun ni havas, kaj ili ne. Kaj se ni tien irus, kelkaj estus tre malgaja, ĉar mankus al ili iliaj elektronikaj ludiloj kaj komputiloj.”

Tiel lanĉiĝas, ankoraŭ naive, ankoraŭ nemature, ne nur lingvoscioj sed ankaŭ internacia kompreno. Ĉi-lastan fortigi volas la lernejestrino *Lin Whyte* per vizito verŝajne ne al Benino, pro la altaj kostoj, sed al pli proksima lando, kie la infanoj de Bar Hill povos uzi Esperanton kaj ekkoni aliajn kulturojn.

Pro la sukceso de Lingvolanĉilo en Kembriĝo facilas preteratenti la alian, malpli grandan lernejon, en *Scorton*, vilaĝo en nordokcidenta Anglio, kie 21 infanoj inter la aĝoj de 7 kaj 11 eklernis en januaro. Ankaŭ ĉi tie pozitive reagis lernantoj kaj instruistoj. Kiel en Bar Hill, plaĉas kanti en Esperanto.

“Oni lernas amuzajn kanzonojn,” diras *Katie*, 10-jaraĝa. Samopinias *Hannah*, ankaŭ 10-jaraĝa: “Kantado gajigas kaj oni pli lernas.” Kaj ŝi notas la avantaĝon de Esperanto kontraste al aliaj lingvoj: “Esperanto helpas al homoj paroli tra la tuta mondo.”

Enkondukas la internacian lingvon en Scorton prezidinto de EAB, *Stephen Thompson*. Dum 25 jaroj li instruis fremdajn lingvojn en britaj lernejoj. Tiel li bone komprenas, ke unue pli gravas al infanoj lerni kiel akiri fremdan lingvon ol koncentriĝi pri aparta lingvo. Tiurilate pli sukcesas Esperanto ol iu ajn alia lingvo kaj jen, laŭ *Stephen*, la signifo kaj valoro de Lingvolanĉilo. Li tre kontentas trovi sin en la klasĉambro: “Bone estas denove instrui infanojn: la elementa lernejo estas la ĝusta nivelo por enkonduki lernadon de fremda lingvo, kaj Esperanto estas la ĝusta lingvo.”

En la lernejo li kunlaboras kun la klasinstruistino, *Alison Dodd*. Ŝi entuziasmiĝas pri la projekto, mirante, kiom lernas la infanoj: “Esperanto ege plaĉas al ili, ĉar ili tiom progresis post malmultom da tempo. Ekzemple, ĝi jam komprenigis al la infanoj, kial ni ŝanĝas vortojn ankaŭ en la angla. Tiel ili akiras kompetentecojn en la gepatra lingvo.”

Ankaŭ la lernejestrino ĉe Scorton, *Liz Smith*, bonvenigas Lingvolanĉilon. Kun plezuro ŝi notas, kiel la studmaterialo provizas per informoj ĝenerale pri lingvo kaj gramatiko, ne simple pri Esperanto. Imponas cetere la kulturaj aspektoj de Lingvolanĉilo: “Nuntempe ni edukas civitanojn de la mondo,” ŝi diras.



klasinstruistino Alison Dodd kaj la sepjaruloj Ambar kaj Matthew

Resume: imponas la progreso de Lingvolanĉilo ekde septembro, kiam eklernis la unuaj infanoj. Preparitaj - ĉefe de la nelacigebla *Angela Tellier* - estas plurdekoj da buntaj, infanoplaĉaj instruiloj: preparataj estas aliaj por la sekvaj jaroj de la projekto. Aldonendas varbiloj, informiloj kaj eĉ kompaktdiskoj por sciigi edukistojn, kaj la publikon, pri Lingvolanĉilo, ĉar espereble aliĝos al la du pioniraj lernejoj ankaŭ aliaj.

Jen projekto, kiu daŭre ŝanĝiĝas, evoluas kaj kreskas. Interesatoj povas sekvi la progreson de Lingvolanĉilo ĉe www.springboard2languages.org, kie legeblas - anglalingve - specimenaj dokumentoj kaj aliaj informoj.

Egale, kiel finiĝos la projekto, eblas diri, ke ĝi jam sukcesis. Prezenti Esperanton al pli ol 100 junaj lernejoj en Britio reprezentas triumfon. Eble, kompare kun aliaj atingaĵoj en la Esperanto-mondo, nur eta triumfo. Tamen ĉiaokaze triumfo.

verkis *Paul Gubbins*
(aperis en revuo *Esperanto*, 2007)



ESPERANTO NOORD-NEDERLAND
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC GRONINGEN



ESPERANTO - taal zonder grenzen